



“TURKIO VOLAS KREI MALAMIKOJN AL LA KURDOJ EN ĈIUJ TERITORIOJ”

Dilek Ocalan. Deputito de la PDP(1).

Dilek Ocalan (Riho(2), Norda Kurdio(3). 1987) estas deputito de la PDP kaj nevino de Abdullah Ocalan, la enkarcerigita fondinto de la PLK(4). Pasintan semajnon(*) kortumo de ŝia naskiĝurbo kondamnis ŝin al du jaroj kaj ses monatoj de karcero sub la akuzo fari “terorisman propagandon”, pro tio ke, en 2016, ŝi prelegis dum enterigo de PLK-membro. Ekde kiam Turkio komencis sian atakon kontraŭ la Afrina Kantono tutampleksiĝis la listo de imputitoj pro “terorisma propagando”.

Kial Turkio invadis Afrinon?

Unue, la turka ŝtato volas dispremi ĉiujn atingojn de la Kurda Liberiga Movado. La unua klopodo estis en Kobano: La Islama Ŝtato kaj ĝihadismaj bandoj volis eniri por forpeli la kurdojn, sed ili ne sukcesis. Nun, la samon oni strebas en Afrino. Turkio volas krei malamikojn al la kurdoj en ĉiuj teritorioj de Kurdio. En Suda Kurdio(5) oni volis fari referendumon; en Norda Kurdio, organiziĝi laŭ kantonoj kaj establi demokratane aŭtonomecon; en Orienta Kurdio(6), krei federacion. En ĉiuj ĉi lokoj, Turkio faris sian eblon por obstakli. Tio signifas, ke Turkio ne estas kontraŭ la politikaj projektoj de la kurdoj, sed kontraŭ la identeco kaj ekzistado mem de la kurdoj.

Kiuj estas la ŝancoj de Afrino?

La rezistado de Afrino estas tre fortika. Civiluloj kaj infanoj estas mortantaj pro la bombadoj kaj sturmoj, kaj la Unuiĝintaj Nacioj tion scias. Tamen, ili faras nenion. La rezistado de Afrino estas je la mano de la tieuloj. La turka ŝtato kaj aliaj ŝtatoj ne volas solvi la situacion de Afrino. Sed ili ne venkis. La turkoj diris komence, ke la bataloj daŭros tri tagojn, kaj pasis jam pli ol monato.

Ĉu oni povas fari akordon kun Baŝar al-Assad, prezidento de Sirio, aŭ ĉu li estas strebanta ŝiri la rezistadon?

Ĉiuj fortoj volas ŝiri la lukton de la kurdoj, por ke tiuj ĉi submetiĝu, sed ili ne povas. Finfine, la kurdoj havas rezistfortojn, kaj la afrina loĝantaro ne forlasos sian landon. Rusio volis lasi la kantonon en la manoj de al-Assad, por ke tiu sin defendu el la turkoj, sed la kurdoj ankoraŭ fortas. Tial, la rusoj lasis libera la aerspacon al la turkoj, kaj tio estas signifoplena.

Kion vi opinias pri la sinteno de Usono rilate la kurdojn?

Ĉiuj aŭtoritatemaj ŝtatoj de la internacia komunumo utiligas la kurdojn nur favore al si. Usono, Rusio aŭ la eŭropaj ŝtatoj utiligas aŭ atakas la kurdojn laŭ siaj interesoj. Tio evidentas.



Notoj: (Nomoj en la kurda lingvo, krom la indikitaj)

- (1) Partio Demokrata de la Popolo (PDP)/Partiya Demokratik a Gelan (PDG). Halklarin Demokratik Partisi (HDP), en la turka.
- (2) Riha (Sanliurfa, en la turka).
- (3) Norda Kurdio/Bakurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la turka ŝtato.
- (4) Partio de la Laboristoj de Kurdio (PLK)/Partiya Karkerên Kurdistan (PKK).
- (5) Suda Kurdio/Bashurê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Iraka ŝtato.
- (6) Orienta Kurdio/Rojhilatê Kurdistanê. La kurda teritorio ene de la Irana ŝtato.



KLARIGOJ:

Aŭtoro: Aitor Aspuru.

(*) Originale aperis en la eŭska ĵurnalo Berria la 7-an de Marto 2018-a.

Tradukis: NXC. Marto 2018-a. Provlegis: DS.